



Boletín

n° 414 Aprilo - Junio 2016



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 414

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj
* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es
Aliaj aferoj (ekcepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961
TRIADOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio
Vicprezidanto: Ángel Arquillos López
Sekretario: Águeda Biurrun
Kasisto: Rosa López
Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Raúl Martínez
Alejandro Escobedo (prezidanto
de Hejs)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8397

Salutvortoj

Karaj amikoj,

Tiu ĉi somera numero de Boletín venas al viaj manoj post du gravaj okazaĵoj koncerntantaj nian asocion komence de julio: nia 75a Kongreso kaj la renovigo de la estraro.

La kongreso en Herrera del Duque estis unu el la plej sukcesaj kaj feliĉigaj kiujn ni spertis dum la lastaj jaroj, laŭ la komentoj de ĉiuj partoprenintoj. Ĝi estis rekorda laŭ la nombro da partoprenantoj, pli ol 150, kio ne estis kutima lastatempe. Ĝi estis tre riĉa el vidpunkto de la programo, kun la partopreno de plej altnivelaj muzikistoj de la nuna esperantista panoramo, kun ambicia teatro, kun prezentado de novaj libroj kaj la ĉeesto de ties aŭtoroj, kun kulmino de diversaj esperantistaj projektoj. Ĝin akompanis labora agado, ĉefe per la okazigo de Seminario por Aktivula Maturigo kunspensita de UEA, kiu ebligis trakti diversajn demandojn de nia esperanta agado, espereble fruktiĝontajn per nia posta aktivado.

La kongreso ricevis fortan apogon de la lokaj aŭtoritatoj, kiuj nin akompanis dum la tuta Kongreso, kaj kiuj solvis ĉiujn problemojn kaj donis impulson institucian al nia aktivado. HEF tre dankas al ili pro tiu apogo, kaj ni esperas ke niaj propraj iniciatoj, kaj niaj demarŝoj por venigi al Herrera eksterlandajn esperantistojn, kaj aparte tiujn de Siberio, kiuj unufoje rilatigis la popolan nomon de tiu regioneto (la ekstrema Siberio) al la origina granda azia teritorio, fariĝis sufiĉa kompenso pri tiu apogo. Ne tre oftas ke nia flago flirtas samrange kun la oficialaj flagoj ĉe tenilo fronte al tia granda konstruaĵo kiel la kulturpalaco de Herrera.

La kongreso fariĝis malfacila komparilo por la venontaj eventoj en nia lando, sed samtempe ĝi estas instigo al la plibonigo de niaj renkontoj, kiuj devas fariĝi pli ambiciaj ol

daŭrigas sur paĝo 2

Enhavo

Salutvortoj	1
Protokolo Ekstrarkunveno	3
Nova kaŝisto de HEF	4
Nova estraro de HEF	5
Pri Grupoj kaj Asocioj	6
Kulturaj iniciatoj	8
Donkiĥoto nun alirebla por ĉiuj en Esperanto	9
Esperanto en somera universitata kurso	10
Kie estas Herrera del Duque?	11
Mia antaŭa kaj postkongresa sperto en Herrera	13
Sukcesa kongreso en neatinda loko	17
Kroniko pri du koncertoj	19
Kial esti tiom dankema al 75-a HEK?	21
Impresoj pri organizado	23
Poezia Angulo	24
Andanto	25
Gravaj figuroj de la hispana soci-kritika poezio...	28
Niaj verkistoj	32

Ĉefa kovrilo: Komuna foto ĉe la halo de la Kongresejo

(Daŭrigo de la paĝo 1)

ĝisnunaj iniciatoj. Ni nepre devas danki la strebadon kaj laboregon de nia surloka aktivulo, Javier Romero, al kiu plejparte ŝuldiĝas la sukceso de la evento, kaj al la ceteraj meritplenaj surlokaj kunlaborintoj.

La kongreso ankaŭ estis la okazo por la deviga elekto de nova estraro. Kiel vi povos legi en aparta teksto, la rezulto estis parta renovigo: kelkaj el ni (ekzemple mi mem kiel prezidanto kaj ankaŭ la vicprezidanto kaj redaktisto de *Boletín*, plus la voĉdonantoj pri edukaj kaj junularaj aferoj) akceptis daŭrigi nian deĵoradon, kaj do ne antaŭvideblas granda rompo en la lastatempa strategio. Ni esperas ke tio signifas kontenton de la anoj de HEF pri la vojo entreprenita, kaj ni esperas kalkuli je la helpo de vi ĉiuj en la novaj projektoj kiujn ni entreprenos.

Aliflanke, ni proponis ŝanĝojn en la postenoj pli ligitaj al administrado de la asocio, kaj ni bonŝancos profiti je la granda kapablo kaj laboremo de la novaj estraranoj, Águeda Biurrún kiel sekretario kaj Rosa López kiel kasisto, por firmigi la asocion kaj solvi la bazajn postulojn de nia membraro kaj niaj aktivuloj. Ni deziras grandan sukceson al ili, kaj samtempe dankas la ĝisnunajn deĵorantojn pro ilia sindonemo kaj konstanta peno por nia asocio.

Ni ĉiuj revenis el Herrera kun grandaj esperoj kaj kun renovigita entuziasmo. HEF montris sin kapabla entrepreni ambiciajn projektojn: ni certas ke tiu kapablo kaj emo montriĝos eĉ pli alta dum la venonta periodo.

Feliĉan someron al ĉiuj!

José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 3-an de julio de 2016 je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno en la Palaco de Kulturo de Herrera del Duque (Badajoz). Ĉeestis la estraranoj: Eduardo Berdor (voĉdonanto), Alex Escobedo (voĉdonanto), Félix Manuel Jiménez (Sekretario), Ángel Arquillos (vic-prezidanto), Raúl Martínez (Kasisto), Águeda Biurrun (vic-sekretario) kaj José Antonio del Barrio (Prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 21 individuaj anoj kaj 6 kolektivaj membroj (Frateco el Zaragozo, Andaluza E-Unuiĝo, Esperanto Kastil-Manĉa Asocio, Kantabra E-Asocio, E-Grupo Bilbao kaj Madrida E-liceo) reprezentataj de ses el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 34 partoprenantoj. La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (17 aprilo 2016).
Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno.

2.- Renovigo de la Estraro.

Pro fino de la periodmandato (2012-2016) estis renovigita la tuta Estraro, la novaj estraranoj por la periodo 2016-2020 estis elektitaj unuanime kaj ili estas la sekvaj:

Prezidanto: José Antonio del Barrio Unquera

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: María Águeda Biurrun González

Kasisto: María Rosa López Martín

Voĉdonanto: Luis Eduardo Berdor Remón

Voĉdonanto: Raúl Javier Martínez Anguita

Voĉdonanto: (Prezidanto de HEJS): Alejandro Escobedo Muñoz

3.- Informo pri la anaro.

Aniĝantaj je la dato 31-a de decembro 2015 (maksimume ŝuldas du jarkotizojn):

Individuaj (OM, DM, PM kaj HM): 198 (el kiuj 7 apartenas al la junulara sekcio HEJS)

Kolektivaj: 13

ENTUTE: 211

Dum 2015 estis ses malaliĝoj (pro propra peto aŭ por forpaso) kaj ok novaj aliĝoj. Se tamen, la Sekretario klarigas, ke por 2016 estos drasta malplialtiĝo de la numero de membroj ĉar oni suspektas, ke inter 20 kaj 30 membroj, kiuj ne pagis la kotizon de 2015, ne plu pagos.

4- Projektoj 2016.

– Don Kihoto: oni daŭrigos la kampanjon pri la bitigita eldono de Don Kihoto, eĉ kunlaborante kun oficialaj instancoj.

– 100a datreveno de la forpaso de Zamenhof: Kvankam ĝi okazos dum 2017, oni devas komenci prepari ĝin ĉi-jare.

– Plibonigo de la administradaj taskoj: oni komencos uzi novan datumbazon pli taŭga ol la antaŭa.

– Hispana Kongreso 2017: Ne estas klaraj proponoj nune. Ĉu eble en Terüelo? Sed pro la Zamenhofa jaro 2017 eble estos pli taŭga iu urbo pli proksima al Madrido. La estraro decidis la urbon antaŭ la fino de la jaro 2016.

5.- Kotizoj por la jaro 2017.

La kotizoj por 2017 restos same ol tiuj de 2016.

6.- Aprobo de la Buĝeto por 2016.

La Buĝeto, prezentita en la Boletín n-ro 412, estis aprobita unuanime.

7.- Sugestoj kaj demandoj.

Luis Hernández proponas krei la postenon de “komisiito pri kongresoj” (neestrara posteno) kaj proponas Javier Romero Tello –n por la posteno, samtempe profitas la okazon por gratuli al Javier pro la bona sukceso de la ĉi-jara kongreso. Rilate al la propono de la komisiito, la Estraro konsideras ĝin akceptinda. Li ankaŭ demandas kiel oni povus kapti por HEF la homojn, kiuj alvenas al eo kaj lernas ĝin interrete, kaj ĉu tiuj homoj povas legi revuojn kiel *Boletín* senpage. La Prezidanto respondas, ke la revuo de HEF disponeblas senpage, krom la lastaj kvar numeroj, kiujn nur la anoj povas legi en la interna spaco de la asocio.

Águeda Biurrún (nova Sekretario) dankas la malnovajn estraranojn pro lia agado dum la lastaj kvar jaroj.

Rafaela Urueña demandas ĉu HEF apartenas ankoraŭ al EEU. La Prezidanto klarigas, ke teorie jes, sed HEF ne pagas la kotizon ekde kelkaj jaroj pro ideologiaj kialoj rilate al la agado de EEU laŭ “eŭropa identeco”.

Sen pli da aferoj por pritrakti, finiĝas la kunveno je la 12:00 horo.

La Prezidanto

José Antonio del Barrio Unquera

La Sekretario

Águeda Biurrún González

NOVA KAŜISTO DE HEF



Mi naskiĝis en Malago en la jaro 1954, sed mi delonge loĝas en Terrassa, Katalunio.

Mi komencis lerni Esperanton per mi mem en la fino de 2008. En 2010 mi ĉeestis la SES, Someran Esperanton Studadon en Slovakio. Kvankam mi multe bezonas plibonigi miajn konojn pri Esperanto, mi jam instruis Esperanton dum la lastaj du jaroj al kvin novaj gelnantoj.

Pro kormalsano mi delonge estas pensiulo.

Mi akceptis kunlaboradon kun HEF, ĉar mi komprenas ke la Federacio bezonas de ni ĉiuj. Mi esperas ke mia kontribuo estos ĝusta.

Rosa López

NOVA ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Dum la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, kiu okazis la 3-an de julio dum la Kongreso de Herrera del Duque, kaj laŭ la tagordo jam anoncita en pasinta Boletín estis aprobita renovigo de la estraro, pro fino de la deĵorperiodo de la antaŭa.

La Kunveno aprobis jenan konsiston kun partaj ŝanĝoj:

La prezidanto, José Antonio del Barrio, kaj la vicprezidanto kaj redaktoro de Boletín, Ángel Arquillos, akceptis daŭrigi en siaj nunaj postenoj dum unu plia periodo.

Restas en la estraro ankaŭ la voĉdonanto - prezidanto de HEJS Alejandro Escobedo kaj la voĉdonanto Eduardo Berdor.

La nova sekretario estos Águeda Biurrun, kiu jam oficis de antaŭ unu jaro kiel vicsekretario.

La nova kasisto estos Rosa López, de Terrassa (Katalunio), kiu unuafoje fariĝas estrarano.

La antaŭa kasisto Raúl Martínez plu restas en la estraro, kiel voĉdonanto.

La antaŭa sekretario, Félix Jiménez, deziras resti ekster la estraro, sed montris sian pretecon helpi la novan sekretario, ĉefe pri la necesaj oficialaj burokrataĵoj, almenaŭ dum la venontaj du jaroj.

Ni tre dankas Félix pro lia agado dum la pasintaj periodoj, kaj certas ke ni povos kalkuli je lia asistado kaj sperto. Kaj ni bonvenigas la novan estraranon, Rosa, kaj deziras al ŝi kaj al Águeda sukceson en iliaj novaj funkcioj. Ili estas ege kapablaj kaj laboremaj esperantistoj, kaj la ceteraj estraranoj tre ĝojas ke ili troviĝas inter ni.

La restantaj estraranoj dankas pro la konfido al ni, kaj kalkulas kun ĉies helpo en la antaŭenigo de la asocio. Kiel ni komentis dum la Kunveno mem, HEF ne povas esti nur la estraro, kaj nia agado dependas de ĉiuj membroj, por esti efika



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ARAGONO

SUKCESO DE LA SEMAJNO DE ESPERANTO EN TERUEL

Inter la 3a kaj 6a de majo estis celebrata la Unua Kultura Semajno de Esperanto en Teruelo (Aragono), organizita de lokaj aktivuloj. Ĝi konsistis el du prelegoj, plus unu ekspozicio pri nia lingvo.

La ekspozicio estis vizitebla inter la 18 kaj 21 horoj en la halo de la Gimnazio Santa Emerenciana, kie troviĝas ankaŭ la Oficiala Lernejo pri Lingvoj, kaj tie deĵoris ankaŭ membroj de la esperantista komunumo de Teruelo, kun diversa materialo. Temas pri la kolekto de 15 paneloj havigitaj de Hispana Esperanto-Federacio, kie eblas konatiĝi kun la historio de tiu ĉi lingvo kreita de D-ro Zamenhof en 1887, ĝia disvolvo en Hispanio, ĝia utiligo en la kinarto, la literaturo kaj la sociaj retoj, la ekzistantaj lernmetodoj kaj kelkaj el la elstaraj personoj kiuj sin interesis pri Esperanto.

Rilate al la prelegoj, ambaŭ estis okazigitaj je la 19 horo en aŭlo de la mezlernejo. Tiun de la merkredo klarigis nia samasociano Alberto Granados, membro de la esperantista komunumo de Teruelo, kaj instruisto de la du kursoj ĝis nun organizitaj en la urbo. Granados parolis ĝuste pri la metodoj lerni la lingvon, per parolado titolita “Kial tiom facilas lerni Esperanton?”.

En la prelego de la sekva tago, ĵaŭdo 5a de majo, partoprenis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kiu parolis pri la nuno kaj estonto de tiu ĉi lingvo.

Trideko da interesitoj ĉeestis ambaŭ prelegojn, kaj montriĝis tre interesitaj pri nia lingvo.

La loka ĵurnalo “Diario de Teruel” publikigis artikolon pri Esperanto je la komenco, kaj aliajn postajn pri ambaŭ prelegoj. Krome, Alberto estis intervjuita ankaŭ de la lokaj radiostacioj.

Kiel konsekvenco de la elano, estis ĵus fondita loka asocio, kun la nomo Liberanimo. Ili planas organizi novan kurson en septembro, ĉe la kvartala asocio de San Julián, kaj ankaŭ studas la inviton al HEF okazigi Hispanan Kongreson de Esperanto, dum la venonta aŭ la sekva jaro. Grandan gratulon kaj bonvenon al la nova asocio!



ANDALUZIO Sevilo

D-ro José Roldán León, prezidanto de la Sevila Esperanto Asocio, la pasintan 25a de majo, prelegis pri la Internacia Lingvo kun la moto "Esperanto ion pli ol lingvo", en la "Oficiala Kolegio de Kuracistoj" kaj la Sevila Societo de Kuracistoj, Verkistoj kaj Artistoj "Nicolás Monardes".

Historia vidado de Esperanto

Li komencis per detala evolucio de la lingvo, ekde la naskiĝo de Zamenhof ĝis hodiaŭ, en kiu li reliefiĝis la pozitivajn momentojn kiel: la Unuan Universalan Kongreson en Boulogne sur Mer 1905, kaj la negativajn dum la kelkaj persekutoj suferitaj en mavaj momentoj de la historio.

Esperanto kiel lingvo

Lin ankaŭ elstaris pri la alfabeto, fleksebleco kaj ebleco krei novajn vortojn per aglutinado de senŝanĝaj morfemoj.

Esperanto en la mondo

Ankaŭ havis sian lokon kelkaj tre interesajn datumoj montrante la gravecon de Esperanto en ĝia natura aspekto.

Eminentuloj kaj Insitucioj (esperantistoj kaj ne esperantistoj) kiuj interesiĝis kaj publike apogis la lingvon: Einstein, Julio Verne, Blas Infante, Tolstói, la UNESKO, ktp. ktp.

-Diversaj aspektoj de Esperanta kulturo: literaturo, muziko, filmo kaj kompreneble Interreto.

-Oficiala instruado de Esperanto en universitatoj ĉirkaŭ la mondo.

Intereso kaj amika atmosfero

Fine estis demando tempo en kiu, kompreneble, ne mankis kiuj plej ofte ripetas: kiom da esperantistoj estas en la mondo? kaj kie oni parolas?

Sekvante la finon de la diskuto de Nikolao Monardes Societo, la kunveno daŭris neformale ĉe proksima trinkejo, kie membroj de ambaŭ asocioj montris reciprokane volon daŭrigi kontakton por estonta kunlaboro.

En Andaluzio oni aranĝas gravan regionan kongreson, kiu okazos de la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro kun ebla ekskurso al Kordovo postkongrese. En luksa kaj bela salono ene de la Municipa Muzeo de la urbo, ni ĝuos prelegojn, deklamadon de poemojn, prezento de novaj libroj, ludoj, ktp. Ni invitas ĉiujn hispanojn ĉeesti, ĉar valoras la penon viziti la monumentan urbon Antekera, kies megalitaj dolmenoj estis agnoskitaj kiel Heredan Havaĵon de la Homaro, krom la naturaj belecoj "El Torcal", "El caminito del Rey", kiun ni vizitos, ktp. Plian informon vi trovos en la ligilo de nia paĝaro: <https://andaluciaesperanto.wordpress.com/> kie vi ankaŭ povas pleniĝi aliĝilon.

Ángel Arquillos

20-a Andaluzia Kongreso
de Esperanto

Esperanto kaj Naturo / Ĉielo kaj Tero

De la 29a de oktobro ĝis la 1a de novembro de 2016
Antequera (Hispanio)

ANTE UERA SOLO

KULTURAJ INICIATOJ

FILMETOJ KUN INFANKANTOJ




Nova kaj tre sukcesa iniciato venas el Sevilo: reta kanalo pri Esperantlingvaj originalaj infankantoj "Babelo Filmoj", kun tre altiraj kaj bonkvalitaj videoj, kiujn eblas spekti kaj aŭskulti ĉe la adreso <https://www.youtube.com/c/babelofilmoj>

Inter ili oni povas spekti la kanto "Dek bovinoj", kiu fariĝis vera furoraĵo inter retaj lernantoj kaj uzantoj de sociaj retoj.

La pretigo kaj registrado de infanaj kantoj estis unu el la aktivajoj programitaj por la Seminario por Aktivula Maturiĝo okazinta en Herrera del Duque depost la 29a de junio, konekse kun la 75 Hispana Kongreso de Esperanto. El la kontaktoj tie kreitaj certe eblas eltiri novajn fruktojn en tiu ĉi tre originala kaj sukcesa iniciato.

EŬSKA LINGVO KAJ ESPERANTO

Ĝus aperis du novaj libroj, kiuj tre interesos kelkajn niajn legantojn, la unua por lerni Esperanton pere de la vaska/eŭska lingvo (*Esperantoa ikasgai*) kaj la alian por lerni la eŭskan el Esperanto (*Ni lernu la eŭskan*). Ambaŭ estis verkitaĵoj de Aitor Arana kaj estas aĉeteblaj en la Libroservo de UEA



DON QUIJOTE NUN ALIREBLA POR ĈIUJ EN ESPERANTO


La 1an de julio, en Herrera del Duque, en la kadro de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, estis prezentita la kulmino de longdaŭra kolektiva laboro de Hispana Esperanto-Federacio: la bita eldono de *La ingenia hidalgo Don Quijote de La Mancha*, la traduko al Esperanto de la senmorta verko de Miguel de Cervantes.

La verko estas nun je la dispo de ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo, libere kaj senpage, en formato *epub*, en la *Bitoteko*, la bita biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio. Vi povas trovi la ligilojn al la verko kaj pliajn informojn pri la projekto en la retadreso <http://esperanto.es/quijote>.

La libro ankaŭ elŝuteblas el la Biblioteca Virtual Miguel de Cervantes, la plej grava hispana institucio zorganta pri la hispanlingva literaturo en elektronika formato, kun kiu HEF interkonsentis pri la samtempa disponigado al la ĝenerala publiko. La adreso en tiu ĉi retejo estas <http://www.cervantesvirtual.com/obra/la-ingenia-hidalgo-don-quijote-de-la-mancha/>.

La anonco pri la evento aperis ankaŭ en la oficiala retejo de la Ŝtata Komisiono por la kummemorero de la 400 datreveno de la morto de Miguel de Cervantes.

HEF ankaŭ produktis kartojn kun konekto USB, enhavantajn la dosieron de la libro, kaj kun tre belajn kovrilojn, novdezajnitaj, kiujn oni povas vidi en apudaj bildoj. La unuajn ni donacis al la urbestro kaj magistratoj de la urbo Herrera del Duque, en tiu publika prezentado dum la Kongreso. La kartoj povas taŭgi kiel donaca materialo, por instituciaj agadoj, sed ankaŭ por donaco al amikoj kaj simpatiantoj.



La projekto bitigi (tio estas, produkti elektronikan dosieron) la libron *Don Quijote* komenciĝis jam antaŭ kelkaj jaroj, kiam Miguel Gutiérrez Adúriz sukcesis arigi grupon de aktivuloj kiuj komencis tajpi la originalan tradukon de Fernando de Diego, publikigitan de Fundación Esperanto en 1977. Krom Miguel mem, tiu grupo konsistis el: Ángel Arquillos López, Luis Eduardo Berdor Remón, Pablo Busto González, Antonio A. Casas Sánchez, Juan Antonio del Castillo Martínez, Ángel García Gutiérrez, Ángel García Santos, Jordi Lieter López, Miguel Ángel Martín Martín, Fernando Mateos Morán, Lorenzo Noguero Sarasa, Sabino Pelegrin Colomo kaj José María Salguero. Poste Ana Manero kaj Manolo Parra reviziis la unuan parton de la retajpita teksto.

La dua elano venis el la laboro de Marcos Cruz, kiu reviziis la tutan verkon, unuecigis kaj aktualigis la formaton, kaj aranĝis la komputilan programaron por produkti la bitlibron. Al tio oni devas aldoni la kunlaboron de Antonio Valén, kiu reviziis la lingvajn korektojn kaj solvis lingvajn dubojn. Miguel Gutiérrez Adúriz kunlaboris ankaŭ per la dezajno de nova ĉefpaĝo.

Krome, oni devas mencii la apogon de aliaj homoj, kiu gvidis la procezon aŭ subtenis la retan prilaboradon. HEF volas substreki tiun komunan laboron, ne nur por danki ĉiujn partoprenintojn, sed ankaŭ ĉar ĝi montras ke per la kunhelpo de bona skipo eblas krei atkvalitajn projektojn, je la servo de nia kulturo.

La estraro de HEF

ESPERANTO EN SOMERA UNIVERSITATA KURSO

Ene de sia somera programo, tiun ĉi jaron la Universitato de Ekstremaduro (UEX) organizis kurson titolitan "En la limoj de la lingvaĵo: artaj lingvoj kaj komunikaj fikcioj", kiuj disvolviĝis dum la 11a kaj 12a de julio en la Instituto pri Modernaj Lingvoj de Kazereso (Cáceres).

La kurso celis konigi kelkajn el la projektoj de lingvoj kreitaj laŭlonge de la historio, kun tre diversaj celoj. La lecionoj analizis la filozofiajn lingvojn kiuj proponas specialan kategoriigadon de la mondo kaj la pensado (*Caramuel*), la lingvojn planitajn kiel lingvajn eksperimentojn en la fikcio (*Laadano*), la lingvojn stetikajn (*Xul Solar*), la lingvojn montrantajn alternativajn mondojn en la kadro de la sciencifikcio (*Klingono*) kaj ankaŭ la lingvojn celantajn faciligi la internacian komunikadon kaj la liberan interŝanĝon de ideoj, kiel Esperanto. Tiun ĉi lecionon pri helpaj lingvoj instruis la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio.

La sperto estis tre pozitiva. Kvankam la nombro de lecionoj estis relative malalta, la kontaktoj kun la ceteraj profesoroj montriĝis tre fruktodonaj. Ili estis ĝenerale tre favoraj al Esperanto, kaj tre scivolaj pri ties nuna situacio kaj perspektivoj, kaj malfermiĝis interesaj kontaktoj por estontaj kunlaboroj. La sperto konfirmas la lastatempe evidentan konstaton pri la renovigita intereso pri Esperanto (kaj aliaj artaj lingvoj) en la akademia medio.

HEF

"Kie estas Herrera del Duque?" "Por ĉiam en mia koro"

La 75a Hispana Kongreso de Esperanto jam estas historio,... mirinda, belega, neforgesebla historio. Jubilea kongresa omaĝo al la tuta kulturo en Esperanto. Festo de amikoj. Internacia, sennacia, senlima kontakto. AMo, arto, muziko, poezio, Siberio, literaturo, Iberia grupo, teatro. Jen la programo. Cáceres, Trujillo. Guadalupe, Monaĥejo, komuna tagmaĝo. Asorti, Ĵomart, Nataŝa, Acetre, Mikaelo... HooO Acetre. Georgo, Sasa, JoMo. Afrika simfonio. Miguel Fernández, lirika muzika unika vespero. Dankon. Camacho, Jorge, Ragnarsson. Invado. Suno. Ŝvito. Liven. Pedro. Emblemoj. Duncan, Sara, István, Irek, AMo. Teatro, kantoj, poemo, Ana Manero. Manolo. Kani, Karmela, Toño, Dankon. Peloche. Nova estraro. HEF. Toño, denove. Ĉiam. Ángel, Mariló, Conchi, Carlos. Paŭla. Paulo. Kaj Vi, kara esperantisto. Karaj amikoj kaj amikinoj. Ĝis 160. Juan, Jesús, Raúl, Eduardo, Alberto, Rafael, Itziar, Águeda, Ricardo, Luz, Alejandro, Sol, Antonio, Abel, Francesc, Jorge, María, Xavi, Saioa, Jaime, Montserrat, Lisha, Félix, Matilde, Rafaela, Luis, Enrique, Ángel, Irina, Jordi, Mirjam, Francisco Javier, Rosa, Emilio, Pablo, Andi, Manel, Antoni kaj ĉiuj kiuj estis kaj ne estis en Herrera del Duque. Homoj, kvinpinta-steloj, esperantistoj, amikoj.

Memoroj, invado. Fotoj, Fejsbuko. Videoj en Jutubo. Mesaĝoj. Inspiro. Herrera del Duko.

Jen kelkaj vortoj pri la herrera kongreso:

Ĵomart kaj Nataŝa: "*Ni neniam forgesos la varman, amikecan kaj ĉarman etoson de la kongreso*"
Georgo kaj Vinjo: "*Dankon pro la renkontiĝo, varmetosa. Ni dankas ke ni povis troviĝi en tia grandioza grupo*"

István Ertl: "*Mi demandas min, ĉu mi iam ajn ĝuis landan kongreson tiom kiel ĉi tiun. Mirinde.*"

Duncan Charters: "*La Kongreso estis escepte riĉa sperto. (...) unu familio venis unuafoje. La patro estis tre skeptika pri la reago de siaj familianoj, neesperantistoj, sed unu el la gefiloj esprimis la reagon "Kiam estos la venonta HEF-Kongreso? Mi volas reveni"*"

Mikaelo Bronŝtejn: "*La tagoj en Hispanio vere iĝis neforgeseblaj por mi pro multego da pozitivaj impresoj. Certe tiuj ĉi inspiras min al kreo de novaj kantoj kaj poemoj.*"

Sara Spanò: "*...esperante iel "digesti" la nekredeblan sperton kiun mi travivis partoprenante la mirindan kongreson en Herrera del Duque. Mi devas agnoski ke tiu procezo bezonos multe pli da tempo... Tutsimple kaj unuvorte: Dankon!*"

Antaŭ pli ol unu jaro mi skribis en ĉi sama revuo *Boletín*: "*De tempo al tempo etaj mirakloj okazas. Kaj jen ni vidas unu el tiuj etaj kaj neatenditaj mirakloj. "Kie estas Herrera del Duque?", vi jam demandis vin. "Kial tie?". "Ĉu ĝi estas interesa kaj turisma urbo?" "Ĉu ĝi ne estas pli vilaĝo ol urbo?" "Ĉu tie estas hoteloj, rezidejoj, granda kongresejo?" "Ĉu la estraro de HEF bontrafis elektante Herrera del Duque kiel kongresan urbon por la venonta jaro?"*"

Jes, kara samideano, la demandoj svarme fontas de via menso kiel versoj ibere libere."

Kaj iom poste mi aldonis, *"Esperanto jam estas miraklo en si mem"*

En Herrera del Duque, ni travivis ian miraklon. En la vivo, kiel en la teatro, ĉio povas okazi. Se vi rigardas la vivon kun espero, ĉio fariĝas bela, ĉio fariĝas bona.

Tion ni spertis dum la 75a Hispana Kongreso de Esperanto.

Dankon al ĉiuj.

Danke al Esperanto.

Dankon, Zamenhof.

Vivu la teatro!

Vivu la vivo!

Vivu Esperantujo!

Brakume kaj varmkore salutas vin,

Javier Romero



MIA ANTAŬ KAJ POSTKONGRESA SPERTO EN LA 75A HISPANA KONGRESO EN HERRERA DEL DUQUE

Mi scias ke multaj homoj raportos pri la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, kaj multaj el ni koincidos rakontante similajn aferojn, pro tio mi decidis verki, ĉefe pri la antaŭkongreso kaj postkongreso.

Du tagoj antaŭ nia veturo al la kongresvilaĝo Herrera del Duque, ja okazis neforgesebla aventuro, ĉar mi konatiĝis kun gravaj geesperantistoj kaj brakumis konatulojn apud la Parlamento ("Las Cortes") de Madrido, kie ni, sub agrabla ombro de arboj, rendevuis por aŭskulti kaj sekvi la ĉiĉeroninon Águeda Biurrun, (nun sekretario de HEF). Ŝi rakontis interesajn anekdotojn kaj kuriozaĵojn pri diversaj stratoj kaj monumentoj de la urbeĝo. Marŝe ni travivis kilometrojn da beleco. Kvankam doloris al mi la tuta korpo, mi sekvis la grupon por malkovri tiun kaŝitan Madridon, kiun oni ne kutimas rimarki, ĉar kvankam mi konis tiun itineron de antaŭlonge, pri la monumentoj kaj konstruaĵoj mi scias preskaŭ nenion, kaj mi profitis la okazon ĝui kune kun kelkaj eksterlandanoj, kiuj ne imagis la imponajn konstruaĵojn de la urbo, kaj mi observis iliajn reagojn. Do, mi ĝuis duoble. Kvazaŭ infanoj, multaj el ili fotis la t.n. Km.0 ĉe la Puerta del Sol, kaj en bona etoso ni alvenis ĝis la Orienta Palaco kaj tuj poste ni atingis la placon de España, kie staras la superbaj statuoj de Donkiĥoto kaj Sancho Panza. Tiu loko estas tre grava, ĉar ĝi estis la rendevuloko por veturi al Herrera del Duque du tagojn poste. De tie ĉi, per metroo, ni iris al la urbo Alkorkono, kie bonvenige atendis nin Javier Romero, la ĉefa organizanto de la kongreso, ĉe la klubejo "domo de Ekstremaduro", kie oni okazis spektaklon por prezenti la kongreson kun ludado de la grupo *Sepa kaj Asorti*, kiuj ofertis al ni kelkajn muzikpecojn en la aŭlo de tiu klubejo, kun ĉeesto de neesperantistoj, kiuj tre ŝatis la spektaklon.





Krom la muziko ni ankaŭ spektis belan filmon pri Herrera del Duque, kaj la prezidanto de la klubo post afablaj vortoj, invitis nin trinki bongustan bieron kaj abundan lunĉon. Mi ankaŭ devas menciigi la skabeniĝon pri kulturo de Herrera del Duque, kiu ankaŭ parolis pri la kongreso, krom Javier kaj la prezidanto de HEF.

La dua tago estis simile varma. Prekaŭ ĉiuj partoprenantoj jam estis alvenintaj. Mi gatis en la hostalo *Madrid*, kie mi salutis homojn kiel: Sepa kaj Asorti, fama esperanto-muzikgrupo el Litovio, kiujn mi konis de antaŭlonge, Georgo Handzlik kaj Saša Polipovic, komika paro da artistoj, Ĵomart kaj Nataša, romantika kantdueto, tre konata de ĉiuj, Irek Bobrzak ĵurnalisto de Varsovia Vento, ktp.

sidejo, ĉar bedaŭrinde la ejo ne estas sufiĉe granda por amaso da homoj, kvankam la etoso kaj bona harmonio estis enorma kaj oni gustumis refriŝigaĝon kaj gustumis kelkajn aperitivojn aŭ simile. Post kelkaj minutoj ni denove marŝis tra la stratoj de la historia urbo ĝis la placo de Santa Ana, celo de nia itinero, kun la intenco konatiĝi kun la menciitaj stratoj de la teatra verko *Noches de Bohemia (Bohemiaj Noktoj)*, de Jose María del Valle-Inclán, tradukita al esperanto fare de Miguel Fernández. Ĉi foje estis Ana Manero, kiu rakontis la kortuŝan historion apud la monumento dediĉita al la mortintoj pro la bombo kaŝita ene de florbukedo kaj ĵetita neintence sur la homamaso de la anarĥiisto Mateo Morral, kiu celis mortigi la gereĝojn.





Mi kalkulas ke ni faris kelkajn kilometrojn piede, sed kun plezuro ni atingis la historian "Viaducto de Segovia", ponto fama pro suiciduloj, la placo de la Villa (Vilao), ankaŭ historia kaj bela loko, kie staras la malnova urbodomo kaj aliaj konstruaĵoj rilataj al la verko de Valle-Inclán. Verdire mi ne estis tre atentema al la rakonto de Ana Manero, ĉar de tempo al tempo mi bezonis decan lokon por apogi mian dorson, kaj mia orelo ne kaptis la dolĉan sonon de nia kara ĉiĉeronino. Alveninte ĉe la arkada monumenta "Plaza Mayor", mi aŭdis nenion, ĉar amaso da homoj bruigis kaj nur de

tempo al tempo mi kapablis aŭdi ŝin, ĉifoje apud la ŝtuparo de unu el la elirejoj de la placo kie staras la t.n. "Cuevas de Luis Candelas", alloga kelo por gustumi bonan vinon, manĝi, spekti flamenkon, ktp.



Unu el la plej tipaj lokoj estis la Kafejo San Ginés, kien ĉiuj vizitantoj de la urbo iras, ĉefe dumvintre por gustumi ĉokoladon aŭ kafon kun la t.n. "Churros". Ana daŭre rakontis kaj mi ne priatentis, sed mi sciis ke ni trairis la historiajn stratojn menciitaj en la teatraĵo. En tiu loko mi fotis bildon pri la aŭtoro Valle-Inclán. Iom poste, traŭrante la placon Puerta del Sol, ni alvenis al la konata strateto "callejón del Gato" por daŭre aŭdi la rakontadon de Ana pri la verko kaj vidi la famajn konkavajn kaj konveksajn spegulojn menciitaj en la verko.

En la placo Santa Ana staras la fama Teatro Español, kaj tie ni finis la ekskurson apud la statuoj de Federico García Lorca, pri kiu ankaŭ Ana Manero parolis. Tujposte kelkaj disiĝis por vespermanĝi kaj ripozi por frue ellitiĝi la sekvan tagon kaj enbusiĝi je la oka matene direkte al la Kongresvilaĝo.





La kongreso okazis enorde kaj oni povas aserti ke temas pri unu el la plej gravaj, sukcesaj kaj fruktodonaj en Hispanio, kun ĉeesto de pli ol 150 kongresanoj.

Por kroni la kongreson du busoj kaj kelkaj privataj aŭtomoviloj kumportis la kongresanaron sub varmega blua ĉielo ĝis la vilaĝo Guadalupe, kie ni vizitis la faman monaĥejon. Mi ne kuraĝas detali la kvanton da artaĵojn en tiu loko, ĉar mi necesus kelkajn paĝojn, kaj nuntempe, ĉiuj ni scias ke danke al Vikipedio ni povas legi multe pli pri ĝi kaj mi

rekomendas tion fari. Post la vizito ni tagmanĝis en impona restoracio "Hospedería del Real Monasterio", tre bone klimatizita, kie ni gustumis la malvarman hispanan supon "gazpacho" kaj bongustan viandon, akompanata de ruĝa vino aŭ biero, dolĉan deserton, ktp.

Post la manĝo, en la Kulturdomo ni aŭskultis kelkajn kansonojn de Mikaelo Bronŝtejn kaj ne mankis prelego de Kani pri "Alia Guadalupe". Mia impresio pri Guadalupe estis tre pozitiva.

Tuj poste ni ekiris al la rivero kun sufiĉa tempo por banado, rigardado de vulturoj, ktp. Unu horo sufiĉis por ĝui la belan panoramon, gustumi manĝeton kaj naĝi en lago.

Jam en la placo de la vilaĝo Peloché, la loka muzikgrupo Acetre, ludis belegajn regionajn kaj eĉ portugalajn kantojn senhalte ĝis la noktomezo. Ili ankaŭ kantis belan kanton en esperanto, kiun ni arde aplaudis.

La postkongreso estis ege agrabla kaj kultura ekskurso al neforgeseblaj lokoj, ĉar ni vizitis la historiajn urbojn Trujillo kaj Cáceres kun ĉiĉeronado de Kani, la dua organizanto de la kongreso. Trujillo estas fama urbo de konkerintoj, kun belega placo kaj multnombraj monumentoj, ne tre granda, sed impona, kiun mi rekomendas al ĉiuj. Ankaŭ la urbo Cáceres estas rekomendinda kaj historia ejo. Unue ni alvenis en la novan flankon, kie ni trafis restoracion "Self service", kaj

kontraŭ nur 13 €, ni gustumis ĉiajn manĝaĵojn kaj trinkis bieron laŭplaĉe kaj senlime. Trinkemuloj malkovris "paradizon". La malnova flanko de Cáceres, t.e. la historia urbo, mirigis min pro la imponaj konstruaĵoj, ĉefe kirkoj kaj palacoj, hereda mond havaĵo, kaj la grandega placo, kie ni kvietigis nian soifon per bongusta biero. Denove mi rekomendas legi pliajn detalojn sur Vikipedio, ĉar mia raporto ne devas fariĝi tro longa por lasi lokon al ceteraj kontribuantoj de Boletín.

Ángel Arquillos



SUKCESA KONGRESO EN NEATENDITA LOKO

Kiam mi sciis pri la okazigo de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Herrera del Duque, mi forte dubis pri ĝia sukceso, ĉar vere, nek mi, nek multaj el la gekongresanoj, sciis kie ĝi situas. Tamen, la entuziasmo kaj laboro de la ĉeforganizanto Javier Romero, faris ke pli ol centseksdek gekongresanoj, venantaj ne nur el diversaj punktoj de Hispanio, sed el la tuta mondo partoprenu la Kongreson.

Antaŭ la okazigo de la Kongreso mem, grupo da gekongresanoj partoprenis en Seminario pri Aktivula Maturigo (Amo), kies inaŭguro, pro ne ĉeesto de la komisiito Sara Spanó, kiu ne povis veni en tiu momento, pro flugproblemoj, faris la Hef-prezidanto José Antonio del Barrio.

La Kongreso okazis en bona Kulturpalaco, kiu enhavis diverstipajn salonojn, kiuj vere taŭgis por niaj bezonoj.

La programo estis vere varia kaj bunta, por kontentigi al ĉiuj ĉeestantoj, kaj eĉ okazis diversaj programeroj samtempe, kio ebligis la elekton de la aranĝo, laŭ la persona prefero.

Ekde la solena inaŭguro, oni konstatis la fortan apogon al la kongreso fare de la aŭtoritatoj de Herrera del Duque, ĉar ne nur dum ĉi tiu kongresa aranĝo, kaj dum la fermo, sed ankaŭ la tagon de la hiso de la flago en la placo antaŭ la pordo de la Kongresejo, ĉeestis la urbestro kaj tri skabebinoj. En tiu sama senco, la gekongresanoj estis akceptitaj de la aŭtoritatoj en la Urbodomo.

Ege bela estis la koruso de Herrera del Duque kiu kantis por ni, i.a. la “Espero” tre bele kaj sekve la muzikbando de Herrera, konsistanta el preskaŭ cent gejunuloj ludis por ni belegajn muzikajojn ege aplaŭdataj de la ĉeestanta publiko, ne nur kongresanoj sed ankaŭ vilaĝanoj.

La Muzika Lirika Vespero, prezentata de Miguel Fernández, estis belega, kaj ankaŭ la kongresano povis ĝui aŭskultante la plej famajn muzikistojn de la esperanta mondo, nome, Jomart kaj Nataša, Asorti, JOMO, kaj Mikaelo Bronŝtein, kiu ravis nin.

Dum la Kongreso estis pluraj konferencoj; Ege interesaj la prelegoj de D-ro Duncan Charters pri esperanta literaturo, de S-ro Salguero pri Ekstremaduro, S-inoj Katerina kaj Elena pri la rusa Siberio, Javier Romero pri Martinus kaj Zamenhof ktp.

Diversaj interesaj aranĝoj okazis: prezentado de novaj libroj fare de Miguel Fernández, prezentado de nova poemaro, de Jorge Camacho, prezentado de la Ibera “Grupo” kaj omaĝo al Jorge Camacho, kaj ĉefe pro ĝia graveco, la prezentado de la bita eldono de Donkiĥoto, fare de José Antonio del Barrio, kiu estis ebla dank’al la laboro de Ana Manero, Marcos Cruz kaj multaj aliaj kunlaborantoj.

Treatro ne mankis dum la Kongreso. Georgo Handzlik kaj Saša Polipovic prezentis, amuzan teatraĵon “La Kredito” kiun multe plaĉis la ĉeestantoj, kaj kiel lasta kongresa programero, la kvara sesio de “Vivu la teatro” prezentate de Miguel Fernandez kaj Ana Manero, en kiu pluraj gekongresanoj partoprenis deklamante, kantante aŭ aktorante.

Kiel leĝe devas okazi, oni okazigis la Ĝeneralan Kunsidon de HEF, en kiu parte estis renovigita la estraro, kaj estis aprobita unuanime la propono de Luis Hernández por ke la protokolo konsistatu la dankemon de la tuta kongresanaro al Javier Romero por la bona organizado de la Kongreso.

Sabate, ni ekskursis al Guadalupe, kie ni vizitis la imponan kaj artvaloran Monaĥejon kaj komune kaj bonege tagmanĝis en la “Hospedería” de la monaĥejo. Revenante al Herrera, kaj post ebla banado apud la diglago, multaj el la ekskursantoj haltis en la proksima vilaĝo Peloche, kie oni aŭskultis bonegan koncerton de “Acetre”-grupo.

Dum la kongreso funkciis Libroservo kun bona sortimento de libroj prizorgate de Pedro Sanz. Verdaj ĉapeloj, kun rulbando pri la kongreso inundo la urbeton kaj ni povas aserti ke la tuta vilaĝo aktive partoprenis en la diversaj altkvalitaj muzikaj prezentadoj. Ankaŭ por neesperantista publiko, antaŭ la komenco de la kongreso, S-ino M^a Rafaela Urueña faris kolokvon kun lumbildoj, en hispana lingvo, por prezenti la mitojn ekzistantajn pri Esperanto kaj instrui la veran sencon de nia lingvo kaj kulturo.

Resume, bone organizita Kongreso en vere internacia kadro, kiu la plej multaj el la ĉeestantoj certe ne forgesos.

Luis Hernández



KRONIKO PRI DU KONCERTOJ

ĴOMART KAJ NATAŜA

Ĵomart kaj Nataŝa regalis nin per serena koncerto laŭ ilia jam konata stilo. Ili interpretis por ni *Envio*, komponaĵo de la gefratoj García Segura, kiun pluraj artistoj jam kantis, kaj kies plej bona versio estas tiu de José Feliciano, almenaŭ laŭ Nataŝa. Jam eblas trovi ĝin en la kanalo de HEF en jutubo. Ankaŭ spektinda kaj spektebla estis *Kisu min multe*, esperantigo de la famega meksika



kanto, unu el la plej konataj en la hispana lingvo. De ilia repertuaro ili elektis *Birdo-*n, kiu laŭ mia humila opinio estas ilia plej bela kanto, malgraŭ tio, ke ĝi posedas maloftan karakterizon: ĝi nur havas unu vorton kiel refrenon. Pacisma subtila kanto: bruaj ŝoseoj, armeoj kaj maŝinoj fronte al la kvieteco natura. Samarkando estas mirinda urbo en Uzbekio, relative proksima de ilia denasklando Kazahio. Tamen, tiu ĉi kanto ne temas pri ĝi, sed pri fantazia loko laŭ la sveda tradicio. Bela elvoka

kanto malpli konata.

Ĵomart kaj Nataŝa ankaŭ oferis al ni la nepreterpaseblan unualibran poeziaĵon de Zamenhof *Homia kor'*, laŭ agrabla, ne tro arda stilo. Se ion oni povas riproĉi al tiu ĉi duopo estas, ke ili ĉiam estas saĝetaj, senbrujaj, nur modere pasiaj.

Sed tute ne gravas. Jen la titolo de alia kanto, originale verkita de Kimo Henriksen kaj interpretita iam de Amplifiki kaj poste de Kimo mem. Malpli danciga ol tiu, ĝi tamen movis niajn piedojn kaj ridetigis pro la simpatio de la kanto kaj la interpreto.

Fine, ili surprizis nin pri versio de *Nothing else matters*, de la roka bando Metallica. Trafé, ĝi estas sendube la plej taŭga kanto de tiu usona muzikgrupo por la paro: belaj gitaraj harmonioj kaj ne tro da perkuto. Mankis nur korda orkestro.

Inter la kantoj, ili parolis pri diversaj aferoj: pri la filino Karina, kiu kantis kun ili, pri la komenco de sia muzika kariero, pri la vivo.

Multajn aliajn kantojn ili ludis (*Ni iĝu arboj*, *La nuboj*, ktp), sed tiu ĉi kroniko alvenas al sia fino. Resume, la sveda duopo ĉarmis nin per siaj voĉoj majstre miksitaj kaj sia kalmo. Ĵomart, krome, estas elstara ritma gitaristo kvankam duope tio ne tiom evidentas.

Post la koncerto ili filmas po 10 sekundoj kelkajn el la ĉeestintoj unu post la alia. Ĉu temas pri privata filmado aŭ ia projekto, kiun ili prilaboras. Ni atendu, ni vidu.

ASORTI

Dum Ĵomart kaj Nataŝa havas tre karakterizan stilon, Asorti estas sufiĉe diversgenra.

Ili povas ludi pop-on, rokon, bluzon kaj eĉ popolajn litovajn kantojn.

Antaŭ la vera longa koncerto, okazis prezento de la grupo per tri kantoj je la komenco de la kongreso. Pro manko da tempo, jam estis preskaŭ noktomeze, ili ludis poste.

Edgar eĉ ludis en Guadalupe iom da siaj personaj modernaj komponaĵoj nur por violono sen la gepatroj.

Multe kreskiĝis la knabo de *Ĉe la maro*. Edgar sentas sin komforta kaj kun la violono kaj kun elektra gitaro, sed miaopinie li brilas pli kvarkorde.

Ĉiuj tri kantas individue aŭ ĥore. Agrable oni malkovris la raspan kaj densan voĉon de "Asortipatro" (lasu min uzi tiun kromnomon), taŭgega por bluso kvazaŭ post tiom da travivaĵoj laŭ aromo viskia. Kiel dirite, ilia repertuaro estas varia, kaj tion ili montris per enkonduko. Ili kantas pri motorcikloj (*Biker*), Ĉinio (*Shanghai*), amo. La plej elstara kanto povus esti *Amo kaj teo*, kiun ili elpensis por la ĉina filma festivalo. La refreno restas facile en la menso.

Aliaj koncertoj en la Hispana Kongreso estis tiuj de JoMo, Mikaelo Bronŝtejn kaj Acetre. Venos kroniko pri tio en la sekvonta numero se alia ne verkas.

Eduardo Berdor



Kial esti tiom dankema al la 75-a Hispana Esperanto-Kongreso?

Malfacilas klarigi kial mi estas tiom dankema al la Loka Kongresa Komitato, al Hispana Esperanto-Federacio, al ĉiuj kontribuintoj kaj al ĉiuj partoprenintoj en la 75-a Hispana Esperanto-Kongreso okazinta en Herrera del Duque (Ekstremaduro) de la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio.

Mi almenaŭ provu listigi la plurajn kialojn de mia profunda dankemo.

Mi estas dankema ĉar parte paralele al la HEK okazis la 26-a Seminario por Aktivula Maturigo de UEA.

Kiel nuna komisiito de UEA pri Aktivula Maturigo, mi aparte ĝojis pro la preteco de Hispana E-Federacio – de ties prezidanto José Antonio del Barrio kaj de aliaj kernaj aktivuloj, inter kiuj kelkajn mi havis la ŝancon jam renkonti en Madrido pasintjanuare - kaj de la LKK – specialan dankon al la nelacigebla, entuziasmiga Javier Romero Tello! - kunorganizi tiom riĉan, internacian kaj sukcesan seminarion.

Dankon al ĉiuj gvidintoj, inter kiuj menciendas: Duncan Charters, Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez Adúriz, José María Salguero, Irek Bobrzak, José Antonio del Barrio, Ana Manero, Eduardo Berdor, Paulo Busto, István Ertl. Danke al iliaj altvaloraj kontribuoj, eblis esplori plurajn eblojn disvastigi kaj valorigi Esperanton kaj ties atingojn, kolekti kaj pridis-kuti rekomendojn, bonajn praktikojn, utilajn ekzemplojn por la ĝenerala plibonigo kaj maturigo de la tuta aktivularo.

Mi estas dankema ĉar la regiono kie okazis la kongreso estas mirinda, plenplena je beleco, tute malkovrinda.

Kiel “sudano naskiĝinta en la Nordo”, mi aparte ĝuis la varmecon (ĉiusence!) kaj la etoson spireblajn en Ekstremaduro; mi diru ke mi retrovis ankoraŭfoje profundan kontakton kun mia suda identeco kaj kun miaj radikoj.

La ekskursoj al la monaĥejo de Guadalupe (gastiganta la mondfaman statuon de Nia Damo), al Trujillo kaj al Cáceres konatigis min kun la regiono, kun ties historio, arto kaj naturo, ankaŭ danke al la elstara gvidado kaj dumekskursa prelegado de José Maria Salguero (*Kani*), energiplena, klera, lerta.

Mi estas dankema pro la ligoj kaj konektoj kiujn mi malkovris kaj pliprofundigis inter mi kaj novaj kaj delongaj amikoj.

Se la prezento de la kara amiko Jorge Camacho pri la poezio de Baldur Ragnarsson revigligis forajn memorojn kaj estetikan sentemon pri poezio, la renkontiĝo kun Miguel Fernández estis kiel subita fulmotondro. Tiom da kunsentemo kaj animsimileco mi tre malofte spertis dum mia vivo; jen, tio okazis, danke al hazarda renkontiĝo inter du sudanoj!

Apud Jorge kaj Miguel, mi certe menciu Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz), Abel Montagut kaj Antonio Valén kiel reprezentantoj de la Ibera Skolo (aŭ de la Ibera Grupo, kiel ili preferas esti nomataj); interkonatiĝi persone kun ili estis unu el la plej grandaj privilegioj kiuj honorigis min lastatempe.

Apartan mencion meritas István Ertl; danke al niaj interbabiladoj mi reakordiĝis kun pluraj flankoj de mia aktivula identeco, iom rebalanciginte la diversajn erojn de mia engaĝiĝo pri diversaj agadkampoj en la Esperanto-Movado.

Krome, mi tutkore dankas Irek Borbzak kaj la teamon de Varsovia Vento, el kies spertoj kaj kutimoj mi multege lernis – ĉefe pri la kerna graveco de interna informado kaj pri la kreado de kunlaboraj ebloj por ĵusaj lernintoj de la lingvo kaj por potencialaj aktivuloj.

Mi estas dankema pro la muziko, kiu riĉigis kaj prilumis niajn dumkongresajn vesperojn: la karaj geamikoj Sepa & Asorti, Ĵomart kaj Nataša (mirindaj homoj, ne nur eksterordinaraj artistoj), JoMo (kiel ĉiam treege danciga), Mikaelo Bronŝtein (unuvorte: elstara!) Miguel Fernández mem (kiun mi ne plu laŭdu, ĉar laŭdoj neniam sufiĉus), ofertis buntan muzikbukedon ĝuindan por ĉiuj ĉeestantoj.

Tre ĝuinda, post la ekskurso al Guadalupe, la sabata surplaca koncerto de la eskremadura muzigrupo Acetre, kiu ofertis mirindan koncerton, dum kiu andaluzaj, portugalaj, eskremaduraj influoj kaj Esperanto elstare kunfandiĝis, por redoni ion unikan al la publiko spektinta ĝin en Pelоче, apud la kongresa urbo Herrera del Duque.

Mi estas fine dankema pro... “Vivu la Teatro!”, arta vespero majstre prezentita de Miguel Fernández kaj Ana Manero. La kvalito de la aranĝo estis ĉiuflanke elstara; inter la kontribuintoj, sendube menciindas (inter aliaj iam menciitaj pro aliaj kialoj) la andaluza poeto Ángel Arquillos kaj István Ertl, kiu amuzigis kaj iusence “defiis” la publikon per monologa, seninterrompa ĉeno da kleraj lingvoludoj.

La aparte kurioza fakto rilata al tiu ĉi kultura aranĝo estas ke, la antaŭan matenon, tute neatendite, mi ricevis la proponon legi dum la vespero la rakonton *La pluvombrelo* de Leonor Ruipérez, esperantigo de la verko kiu ricevis la duan premion en la Dua Konkurso pri Rakontoj organizita de la madrida najbar-asocio *Los Pinos de Retiro*.

Same neatendite, mia rilato kun la scenejo magie enŝaltiĝis, kaj la legado transformiĝis en aktorado. Temis pri vere unika kaj ripetinda sperto – interalie, post kelkaj tagoj mi eksciis de Saša Pilipoviĉ (kies interpretado, kune kun Georgo Handzlik, de la teatraĵo “La kredito” – elhispanigita versio de verko de Jordi Galcerán – premiere furoris dum la kongreso) ke ofte virinaj roloj mankas en la Esperanto-teatraĵoj... Ni vidu kio okazos estontece!

Konklude, mi estas dankema pro pluraj kialoj, sed unu el ili bone resumas ĉion: mi dankemas pro la granda instigo, antaŭenpuŝo, entuziasmigo kiun mi ricevis de tiu ĉi landa kaj internacia kongreso.

Danke al tiu ĉi eksterordinara sperto, mi sentas min eĉ pli energi plena por alfronti la venontajn defiojn!

Sara Spanò



IMPRESOJ DE ORGANIZADO

Kiel organizanto, mi povis vidi kelkajn detalojn ĉe la Hispana Kongreso kaj aferojn de maniero diferenca al tiu laŭ kiel oni povas rigardi kiel kongresano. Tio povos utili ne nur al estontaj organizantoj de eventoj, sed ankaŭ al normalaj partoprenantoj kiuj povus kaj devus sperti kongresojn ne nur kiel ricevota servo sed kiel kolektiva klopodo de grupo de esperantistoj kaj foje eĉ de neesperantistaj simpatiantoj. Ja per tiu ĉi okazo ni vidis kiel eblas organizi kongreson havante nur unu esperantiston surloke kondiĉe ke tiu ricevu helpon de aliaj proksimaj organizantoj kaj de aliaj kunlaborantoj por specifaj taskoj, kiel akceptejoj, monkollektado, filmado, teknikaj rimedoj ktp.

La iama polemiko inter allogaj turismaj konataj urboj kaj aparta dekomence neallogaj urboj iĝis solvita. Ja kongresanoj serĉas interesajn monumentojn, tipajn vidindaĵojn ktp. Sed malgrandaj urboj povas disponigi el favoraj havigoj, kiel okazis ĉifoje. Ekzemple, sindediĉo de aŭtoritatoj kiu ĉiukaze montriĝis en senpagaj amasloĝejoj kaj kongresejo, ricevo en la urbodomo, ĉeesto dum programeroj, partopreno de lokaj aŭ regionaj artistoj kaj gravuloj, dankemo pro la alveno de eksterlandanoj ktp.

Ja internacia partoprenantaro endas por la sukceso de nacia kongreso, spite la ŝajna kontraŭdiro. Do, organizantoj devas cerbumi por allogi eksterkandanoj ĉu kiel prelegantoj, artistoj ktp, ĉu kiel simplaj kongresanoj, kiuj cetere kontribuos al la sukceso de la kongreso. La ĉeesto de eksterlandanoj ebligas kaj eĉ devigas la necesan uzadon de la internacia lingvo. Tio se ne evitas, almenaŭ malpliigas krokodiladon. En nia okazo krome la hazarda koincido inter nia hispana Siberio kaj la rusa pli konata Siberio ebligis diversajn programerojn kaj allogaĵojn por la kongreso.

Reveninte al la temo de la kolektiva organizado, meritas la penon komenti ion pri la programeroj. En universalaj kongresoj oftas la koincido samtempa inter diversaj programeroj foje same altiraj. Tio malhelpas la organizado de la propra tempo de la kongresanoj kiuj ofte suferas ĉar oni ne povas esti duloke samtempe. Por la kongreso de Herrera foje okazis sama afero, pro troa kvanto de programeroj kaj la tempo mankis por la normala disvolvigo de tiuj. Feliĉe la filmado kaj posta publikigo de la filmetoj almenaŭ permesis ke tiuj, kiuj maltrafis aferojn pro dediĉo al aliaj aŭ pro diversaj kialoj, povu profiti el la kono ĝis tiam perditita.



La vetero estis al mi kaŭzo por malfeliĉo dum jam multaj Esperanto eventoj aŭ renkontiĝoj. Foje pluvis dumlonge aŭ ege kvante, kaj foje varmo malpermesis komfortan estadon en kongresejoj, ekskursoj aŭ eĉ en noktaj dormejoj. Tio estis temo por pristudi kiam oni planis tiun kongreson, sed finfine se oni disponas de klimatizilo, ĉio povas iri enorde. Oni ne timu tiajn aferojn, ĉar kiam oni planas kaj organizas, oni ne povas esti certa pri kio okazos vetere. Kuraĝu, kaj poste oni vidos ĉu eblas alĝustigi la programon al la veterkondiĉoj.


Pri la tempo dediĉita al la diversaj programeroj oni devus esti akurata por ke la prelego, arta prezentado aŭ io ajn kongruu kun la planita tempoparto. Por tio oni devus dekomence scii kiom da tempo necesas por ĉiu programero. Ĉio devas esti antaŭkalkulita kaj la troigoj devas esti evitataj. Plano devas inkludi tempopaŭzon por ke la ĉeestantoj ripozu, kafumu, kaj libere babiladu, ĉar unu el ĉefaj celoj de kongresoj estas kontakti kun homoj, paroli, interkonsenti por postaj kunlaboroj ktp. Kaj kongreso devas permesi tion.

La jam kutima kolektiva spektaklo “Vivu la teatro!” estas elstara okazaĵo de la lastaj kongresoj. Kolektiva prezentado estas tre bona afero. Ja ankaŭ Esperanto estas kolektiva afero. Tamen oni ne troigu, ĉu por tio, ĉu por inaŭguro aŭ por io ajn. Tri horoj estas tro da tempo, kaj kongresoj ne povas esti tro ambiciaj, riske ke oni pereu pro troa sukceso.

En Herrera ni disponis el diverseco: AMO Seminario, serioze, humoraj artaĵoj, prisiberia ekspozicio, lokaj artistoj, ŝak-ĉampiono, junuloj, eksterlandanoj, altnivelaj artaj prezentadoj, krokodiluloj, komencantoj, kurso por komencantoj, klerigaj prelegoj, ampleksa libroservo, kongresa materialo, apudaj trinkejo kaj vendejo, aŭtohaltigejo, afabla akceptejo ktp. Ĉion tion ebligis tre kunlaboremaj helpantoj kaj kongresanoj.

Pri kongresanoj, estas tro komentita afero ke esperantistoj estas ofte tro plendemaj, postulemaj, protestemaj ktp. Certe ankaŭ ĉifoje aperis plendemuloj, postululoj, kritikuloj ktp. «Ĝuste varmo», «estas malvarmo» (pro klimatizilo), «oni ne aŭdas», «la manĝo malbonkvalitas», «la biero trokostas», ktp. Certe tio estas plago en Esperantio. Plej ofte tiaj kondutoj venas de homoj kiuj ne organizas kaj deziras ke oni donu al tiu ĉion kontraŭ neniom. Laŭ mia opinio, oni devas sciigi al tiuj pri la penoj kiujn kostas organizado.

La hispana movado suferas multajn mankojn, ekzemple de organizantoj. Ankaŭ tiukadre ni iel malsukcesis. Dum landa kongreso oni devus jam scii kie okazos la venonta, ĉefe por ke la estontaj organizantoj vidu kiel funkcias kongresoj kaj kongresorganizado. Tio certe utilos.



Kani

POEZIA ANGULO

"Ne aparte"

En Majorko, kun miaj du pli aĝaj fratinoj,
mi memoras la morton de nia patro
antaŭ dudek jaroj.

Kaj mi demandas min silente
ĉu iu memoros min, senidan,
dudek jarojn post mia morto.

Probable ne. Kun miaj poemoj
verkitaj en lingvo neglektinda
mi fados en forgeson ne aparte zorgigan.

Jorge Camacho

Nostalgiaj revoj

Senakompana vi estas,
kara soleco.
Vi solas kaj mi tre lacas
kun susurada bruego
de nostalgiaj revoj.
Mi demandis al Aŭroro,
sed mi ne havis respondon,
ĉar malsaniĝis la nokto
kaj alvenis vi soleco.
Senakompana vi restos
kaj mi kun la miskompreno
debatos pro la bruego
de nostalgiaj revoj.

Ángel Arquillos

ANDANTO

[La redakcio de Boletín plej elkore dankas Miguel Fernández, la aŭtoron de ĉi rakonto apartenanta al lia novelkolekto La vorto kaj la vento (Rakonta kolieroj), publikigita de la nov-jorka eldonejo Mondial fine de la pasinta marto, pro tio, ke li permesis al ni aperigi ĝin en nia revuoj].

“Diana, mia edzino, mortis la tridekan de julio 1993”. Tiel li anoncis al la geamikoj la gale amaran novaĵon.

La sekvan trion da jaroj li tute ne ekzistis. Nenion li memoras prie, krom ia blanka makulo, kiu envolvis lin ĝis la momento, kiam li elkokoniĝis el ĝi ĉe la vido de... Diana promenanta surstrate!

Li elbusiĝis haste, trabatis al si vojon sur la trotuaro, kuris, kuregis al ŝi, tuŝis ĉesultre la virinon kaj anhele kriis:

–Diana!

Ŝi turnis al li la vizaĝon terurite.

–Jes ja! Mi scias, ke ne eblas, sed temas ja pri vi! Vi estas Diana! –li ekkriis.

Konsternite ĝis la medolo de siaj ostoj, elmienante profundan ĝeniĝon, abrupte ŝi dispuŝis disde si liajn manojn kaj plendis:

–Mi ne estas Diana. Vi tute konfuziĝas. Bonvolu lasi min en paco.

–Pardonu, sinjorino.

Sed temis ja pri ŝi. Li ne havis eĉ plej etan dubon. La sama voĉo, la samaj okuloj, la sama hararanĝo, la sama vesto... Ŝiaj impone perfektaj kruroj. Ŝia unika paŝado... La balancado de ŝiaj koksoj... Ŝi. Tutcerte.

Li sekvis ŝin. Helpis kiel remparo svarmo da sabataj aĉetemuloj, kiuj piedis ien tien kaj ne malofte kunpuŝiĝis. Li rimarkis, ke, inter pluraj sakoj, ŝi kunportas unu el Librejo Erato.

Ŝi haltis ĉe stratpordo. Plej probable, de sia hejmo. Pordisto deprenis de ŝiaj manoj ŝiajn sakojn. Malapero.

Kvin minutojn poste, li turnis sin al la pordisto:

–Pardonu, sinjoro. Mi komizas ĉe Librejo Erato. Sinjorino svelta, distingita, kiu loĝas ie en ĉi konstruaĵo, vizitis nin hodiaŭ kaj aĉetis diversajn librojn.

–Ho, jes. Mi konstatis. Temas pri s-rino Nerea. Diru al mi, mi petas –la pordisto aldonis kun malpordisteca ĝentileco.

–Nu, ŝi donis al mi sian adreson, sed forgesis pri la nomo, la etaĝo kaj la pordo. Ĉu vi tiel afablus ilin havigi al mi?

–Mi povas voki ŝin kaj... –proponis la pordisto.

–Ho, ne, dankon! Mi estas pelata de urĝeco. Sufiĉas, se vi mem tion indikos al mi.

La pordisto plene falis en la reton: Nerea Davies, dua etaĝo, apartamento C.

Per tiuj donitaĵoj, facile li trovis la telefonnumeron. Kaj per la sama fajna lerto uzita ĉe la pordisto, telefone li sukcesis: unue atingi post multaj vokoj, ke ŝi ne remetu la parolilon. Due, konviki ŝin, ke li ne frenezas. Ke li ne estas unu el la multaj danĝeraj psikopatoj abundaj en la grand-urboj. Ke li bezonas ŝian helpon. Ke li povas helpi ŝin repreni la perditan vivĝojon: la edzo mortis antaŭ ĝuste tri jaroj!!!

Ŝi postulis nur unu kondiĉon: neniam li nomu ŝin Diana, sed Nerea.

Li tion faris. Sed lia konvinko, ke Nerea estas Diana, absolutis, malgraŭ la absurdeco de tiu aserto.

Baldaŭ la spirita distanco inter ili reduktiĝis. Kurioze, li prezentis, kiel ŝi diris al li, enorman kvanton da trajtoj komunaj kun Arturo, ŝia mortinta edzo. Iom poste li kredis vidi, ke ĉe ŝi aperas io pli alta ol amikeco. Ke eĉ ekflirtis amo super ŝia kapo. Lin rilate, li amis ŝin de ĉiam, sian Dianan.



Kiam la amo faris nepra sian ampleksigon al amoro, ŝi rifuzis. Tamen ial ŝi montriĝis ĉiam pli ema lasi sin proksimigi al la personeco de Diana. Kaj eĉ permesis al li paroli kvazaŭ ŝi vere estus ĉi lasta. Kaj tiam li komencis ŝin surprizi pleje:

–Tiu or-ujeton, kiu pendas je via koliero, mi donacis al vi en Florenco, kiam ni vizitis la galerion Uffizi. En ĝia interno, videblas la vizaĝo de Simonetta Vespucci. Kaj sur la dorsa flanko, iu venecia gravuristo skribis por vi etlitere: *Simonetta, il vostro passo di velluto / E il vostro sguardo di vergine violata*.

–Prave!!!

Li parolis al ŝi pri ties kurioza trio da belgrajnoj fine de la lumbo.

–Nekredeble certe!!!

Ŝi petis de li fotojn de Diana. Rigardante ilin, ŝi ne rimarkis grandan similecon inter ili ambaŭ. Tamen li insistis pri ilia absoluta sameco. Kiam li prezentis ŝin al siaj geamikoj, ĉi tiuj miris, ke li trovas ajnan trajton de Nerea komuna kun tiu de Diana.

–Eĉ pli, la okuloj de la unua bluas, ŝia haŭto rozas kaj ŝiaj haroj blondas kaj pendas malsupren sur la ŝultroj, dum la dua nigr-okulis, bronz-haŭtis kaj havis afrikanecajn harojn –asertis la plej bona el liaj kompanoj.

Tion li tute ne povis kredi! Li rigardis la okulojn de Nerea, de sia Diana, kaj ili evidentigis sin scintile grafitaj! Li rigardis ŝian haŭton, kaj tiu montris sin kvazaŭ rostita de la suno! Li karesis ŝiajn harojn, kaj liaj manoj perdiĝis en la frondo de ŝiaj nigraj frizoj!

“Simonetta, il vostro passo di velluto / E il vostro sguardo di vergine violata”: itale, “Simonetta, via paŝo el veluro / Kaj via rigardo de virgin’ seksperfortita”. Versparo el la itala poeto Dino Campana (1885-1932).

Tempopase Nerea konvinkiĝis, ke li ne mensogas. Ke li perceptas ŝin tia, kia li priskribas ŝin. Kaj ŝi akceptis tion. Ja ŝi sentis sin bele amata. Ne gravis do la mensaj procezoj de la amanto. Kaj ŝi deziris lin. Ŝi volis akcepti kaj senti lin ene de si. Kaj konfesi al li, ke en la tago de ilia renkontiĝo, ŝi vidis lin de sur la trotuaro, kiam li busis. Kaj ŝi preskaŭ svenis de teruro: li estis la viva portreto de Arturo. Ŝi akcelis siajn paŝojn por apartiĝi de tia vizio, por fuĝi el ĝi. Ŝi timis, ke ŝi eksuferas halucinojn... Kiam li tuŝis al ŝi la ŝultrojn, ŝi pensis sin tuj mortonta... La fakto, ke li ne nomis ŝin per ŝia nomo igis ŝin kompreni, ke la afero ne transmondas. Tamen...

... Nelonge poste ili duopis en ŝia dormoĉambro. Ili senvestigis unu la alian. Ili estis spertontaj la unuan amornokton post trijara paŭzo. Ili senpacience sin pretigis por fari ĝin tiel ĝu-plena, kiel ĉiuj aliaj amornoktoj kune travoluptitaj alitempe. Jam tute nudaj, ŝi serĉis lian buŝon, li alpremis ŝin al siaj koksoj...

Miguel Fernández

GRAVAJ FIGUROJ DE LA HISPANA SOCI-KRITIKA POEZIO APOGAS ESPERANTON

PREZENTO DE LA POEM-ANTOLOGIO *NOVA MONDO EN NIAJ KORJOJ*

La poem-antologio *Nova mondo en niaj korjoj* estis prezentita al la madrida ĝenerala publiko kadre de la pasintaprila Internacia Libro-Tago, en kiu oni solenis la 400-jariĝon de la morto de la universalaj Cervanto kaj Ŝekspiro. Kiel sciante, la verkon konsistigas kolekto de nuntempaj soci-kritikaj poemoj elhispanigitaj de mi mem. El ĝi elstarigindas tri aspektoj. Unue, ĝi estas produktita de neesperanta eldonejo, Calumnia, kun la apogo de Libroservo de SATEH. Due, per ĝi Calumnia iniciatas kolekton de esperantaj literaturaĵoj nomatan *Revo lucida*. Trie, ĉi-libre, verŝajne por la unua fojo en la historio de Esperanto, oni prezentas al la publiko la esperantigon de naci-lingva antologio de difinita tipo de nuntempa poezio apendice aldonante al la kompilitaj poemoj



originale esperantajn kontribuojn de E-poetoj al komuna temo. Ni koncernatoj: Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem, dankas la kompilinton, la junan doktoron pri hispana filologio kaj poeton Alberto Garcia-Teresa, pro ties entuziasma apogo al tiu ideo, kio honoras nin kaj Esperantujon.



La prezento okazis kuntekste de festo sub la libera ĉielo, sur publika placo, sur kiu oni fine konstruos bibliotekon jam pli ol dudek jarojn depostulatan de la najbararo de la madrida kvartalo

San Fermin. Malfacilus trovi lokon pli taŭgan por nia celo kaj kie la versoj el nia antologio akirus pli da senco.

La plejmulto el la publiko, multnombra, sidis sur seĝoj ĉe la centro de la placo. Virinoj de la najbar-asocio malfermis la feston deklamante poemojn de hispanaj poetinoj vivintaj en la epoko de la Dua Hispana Respubliko. Post ili, venis nia vico, konceptita kiel la kerna programero de la aranĝo, kies finan punkton metis la gajigaj taktoj de ĉi-kvartala fanfaro.

García-Teresa kiel kompilinto de la antologiitaj poemoj kaj mi mem kiel ties tradukinto prologis la prezenton de nia verko. Post tiu prologo, mi donacis al reprezentantino de la najbar-asocio unu ekzempleron de *Nova mondo en niaj koroj* kaj alian de *La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha*, en majstra traduko de Fernando de Diego. Honoras nin esperantistojn la fakto, ke ili ambaŭ iĝos konsistiga parto de la E-sekcio de la brave perbatalita futura biblioteko de la kvartalo San Fermin.



Tuj poste ekis la poemdeklamado. María Ángeles Maeso, unu el la ĉefaj figuroj de la nuntempa hispana engaĝiĝinta poezio, deklamis unu el siaj poemoj troveblaj en la antologio, kaj nia kompanino Ana Manero, alnomata



“la velura voĉo de Esperanto”, faris la esperantan replikon. Sekvis la partopreno de nia Jorge Camacho. Ĉi-okaze, kompreneble, ne necesis du homoj. Li voĉlegis unu el siaj antologiitaj poemoj, en sia hispanigo, kaj replikis mem deklamante siajn respondajn originale esperantajn versojn. Poste venis al mi mem mia vico fari deklamon kiel antologiita poeto. Mi ne elektis

iun ajn el miaj poemoj legeblaj en la antologio, ĉar ili tre longas. Parola poezio postulas alian ritmon. Anstataŭe, mi voĉlegis mian hispanigon de nova E-poemo, kiun tuj poste mi mem deklamis. La unuan deklamrondon fermis Antonio Crespo Massieu, alia el la grandaj figuroj de la nuntempa soci-kritika hispana poezio. Crespo deklamis unu el siaj poemoj de mi esperantigitaj por la antologio. Kaj mi havis la honoron fari la esperantan replikon (*Tio kio restas*) antaŭ la mikrofono.

Ekis la dua deklamrondo. Ĝi havis saman skemon kiel la unua, kun unu escepto: Crespo Massieu voĉlegis neantologiitan poemon, imponan, kvankam eble iom tro longan por la okazo, sed plej oportunan pro la temo: bruligo de la Nacia Biblioteko de Irako en 2003. Per mia esperanta repliko al ĝia lasta parto finiĝis la prezento de *Nova mondo en niaj koroj*.



La reago de la publiko estis vere korekara. Ja en tiu kvartalo Esperanto jam fariĝis unu el la multaj kulturaj eroj, pri kiu oni spontane kalkulas en tiuspecaj eventoj. Ĉi-kvartale, ĉefe en la Internacia Junulgastejo San Fermin, jam de pluraj jaroj ni dulingve (hispane-esperante) prezentas niajn poemojn, niajn verkojn, ludas kantojn... García-Teresa, Maeso kaj Crespo Massieu estis vere mirigitaj de la akceptemo kaj la simpatio al Espe-

ranto far la publiko. Kaj absolute ravitaj, kiel ili mem konfesis, de la eksterordinara beleco de nia lingvo. Ĝis tioma grado, ke ili proponis ripeti ĉi prezenton ne nur en Madrido, sed ankaŭ en aliaj hispanaj urboj.

Prezento de la poezia figuro de María Ángeles Maeso kaj la poemo *Formikoj* el ŝia poemaro *Vamos, vemos* [Ni iras, vidas], en traduko de Miguel Fernández, legeblas en *Boletín*, n-ro 408, Oktobro-December 2014. Jen la poemo de Antonio Crespo Massieu deklamita de mi mem en la unua deklamrondo (kiel legeblas en *Nova mondo en niaj koroj*, la originala hispana versio de ĉi poemo aperas en la kolekto *En este lugar* [Ĉi-loke], 2004):

TIO KIO RESTAS

Oni povus taksi ĝin tiel fora
kvazaŭ ĝi preskaŭ ne estus okazinta
kvazaŭ la polvo de la grizaj horoj
sekigus la aŭdacon la neĝon aŭ vortojn
fajrajn la senĉesan pluvon de la mateniĝo
la momenton de la Ne multobligita

Kvazaŭ ĝi estus okazinta
kaj ne plu estus

Sed ĝi restas
(kaj parolas)

Kiel forgesi la truon per kiu ni estis
vunditaj la interrompon la cikatron de la historio
la sekundon ĉesigitan la vakuon
kiu estis amaso
unuanima interkonsento diferenco
ĉion ne diritan de tiom da voĉoj
la rompitan paroladon, la foreston la atendon
la aŭskultadon kaj ties tremon
(la agon kaj la krion)?

Kiel forgesi
ke ni estis?

Duonkudru memoron kun silento
lante tiru la fadenon
streĉu la oreilon

por ne forgesi
ke ni estis

Por esti morgaŭ
(kiel nun ni estas)
la truo kiun ni faris.

Miguel Fernández

NIAJ VERKISTOJ

La redakcio de *Boletín* esprimas sian ardan gratulon al niaj kunlaborantoj kaj membroj de la t.n. *Ibera skolo* aŭ *Ibera grupo* Miguel Fernández, Jorge Camacho kaj Suso Moinhos pro ilia altnive-la, intensa, diversa kaj fruktodona beletrumado. En la unuaj monatoj de ĉi jaro, aperis ne pli kaj ne malpli ol tri libroj de la unua verkisto, du libroj de la dua kaj unu de la tria! Kadre de la pasinta 75a HEF-kongreso en Herrera del Duque (Ekstremaduro), kie la tuta *Ibera skolo* aŭ *Ibera grupo*, kaj speciale ĝia ekstremadura membro, Jorge Camacho, ricevis omaĝon, la ibergrupanoj Jorge Camacho kaj Miguel Fernández prezentis siajn respektivajn librojn.

Ni vidu, pri kiuj libroj temas. Ni komencu per Miguel Fernández. De li aperis, unue, lia komentita traduko *Bohemiaj lumoj* de la teatraĵo *Luces de bohemia*, de Ramón María del Valle-Inclán, publikigita de MEL (Madrida Esperanto-Liceo) kiel la n-ro 11 de la kolekto Hispana Literaturo, aŭspiciita de HEF, kun la morala apogo kaj teknika helpo de Libroservo de SATeH. Due, la antologio de nuntempa hispana soci-kritika poezio *Nova mondo en niaj koroj*, publikigita de la neesperanta eldonejo Calumnia, de Majoroko, same kun la apogo de SATeH. Ĝin konsistigas 60 poemoj de 20 el la plej prestiĝaj figuroj de tiuspeca poezio, en esperantigo de Miguel Fernández, al kiuj apendice aldoniĝis originalaj E-poemoj de tri hispanaj poetoj, kiuj, por pripoemi sian socian kritikon, uzi(a)s ne la hispanan, sed Esperanton: la samaj Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández mem. Trie, ties originala kolekto de E-noveloj *La vorto kaj la vento* (*Rakonta koliero*), kie kolektiĝas ĉiuj rakontoj verkitaj de Fernández inter 1992 kaj 2015. Ĉi libro vidis la lumon en Nov-Jorko, en eldono de Mondial.

De Jorge Camacho aperis unue lia poemaro *Strangaj spikoj*, kun poemoj de li verkitaj inter 2011 kaj 2016. Ankaŭ ĉi poemaron eldonis Mondial. Due, *Palestino strangolata*, kolekto de jam publikigitaj poemoj de ĉi aŭtoro pri la palestina problemo. Ĉi libron publikigis MAS (Monda Asembleo Socia).

Ankaŭ la libron de Suso Moinhos konsistigas poemoj. Temas pri lia unua poemaro, *Laminarioj*, eldonita de la slovaka eldonejo Espero. Sed Moinhos ne povis ĉeesti la kongreson.

Kun sama ĝojo, pere de la revuo *Esperanto*, ni sciigis, ke la librecana antologio *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*, eldonita en 2014 de Libroservo de SATeH kaj aŭtorita de Miguel Fernández kiel kompilinto de tekstoj, tradukinto kaj komentinto, aperis en la furorlisto de plej venditaj libroj en 2015 en la libroservo de UEA.

Ĉiuj ĉi mirindaj novaĵoj igas nin fieri pri niaj iberagrupanoj, danki ilin pro ties granda peno por riĉigi la E-literaturon per altkvalitaj verkoj kaj instigi niajn legantojn akiri ĉi librojn en niaj kutimaj libroservoj (ĉefe SATeH kaj UEA) kaj traĝui ilin.

La Redakcio

